# Mi ĝuas

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Vi tuŝas min kaj mi forgesas ĉion
Kaj malaperas ĉiutaga mond'
Nur vi kaj mi kaj molaj lipoj viaj
Kaj dronas mi en varma, senca ond.

Kaj ne plu estas akraj laŭtaj sonoj
Nur sonas en silento mole ĵaz'
Nur varmo, nur muziko kaj mallumo
Nur vi kaj mi kaj, soifo kaj oaz'

Vi tuŝas min, vi estas mia muzo,
Mia inspiro, mia buddo, mia lun',
Passio mia, mia nokta bluzo,
Juneco … kaj la fortun'.

Rf: Mi ĝuas …

Vi tuŝas min kaj mia haŭto frostas.
La tempo haltas, perdas sencon spac'.
Ni longe ŝvebis ie en la kosmo
Ĉirkaŭprenante reciproke
En iu stranga dans'.

Mi tuŝas vin kaj flustras vian nomon
Vi estas tiel bela en krepusk'
Vi tenas por momento vian spiron,
Okulojn fermas kaj
Vi troviĝas tute en la ĝu'.